# NOVAĴLETERO

**Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista**
**Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep**

Nr. 6 - Maart 1984

**Ver. Uitg.:**

**Roland Rotsaert**
**Visspaanstraat 97**
**B-8000 Brugge**

**Tel. 050/33.00.04**

Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85 van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge. Steunende leden: 500 fr.

Bijeenkomsten (behalve indien anders vermeld):
Elke eerste en derde donderdag van de maand, om 20 uur, in De Wandelinghe, Baron Ruzettelaan 110, 8320 Brugge 4 (Steenbrugge)

| | |
|---|---|
| 15 maart 1984 | geen bijeenkomst |
| 17 maart 1984 | Gent, Korte Meer (vergaderzaal ASLK): ééndags-basiscursus Esperanto ("rapidkurso"). Inlichtingen bij Patrick Haerinck, M. Verdoncklaan 77, 9219 Gent (tel. 091/30.51.20). |
| 24 maart 1984 | Antwerpen, Frankrijklei 140, 14 uur: Algemene vergadering Vlaamse Esperanto-Bond. |
| 5 april 1984 | Voorbereiding van diamontage over Brugge die zal vertoond worden te Boulogne. |
| 5-6 mei 1984 | Markola Kongreso, Boulogne-sur-Mer. |
| 31 aug.-2 sept. | Congres Vlaamse Esperanto-Bond, Aalst. |

## Lidkaarten

De leden die hun lidkaart nog niet ontvangen hebben, vinden deze in bijlage. Als uw naam op de eerste bladzijde in het rood geschreven werd, betekent dit dat wij uw betaling nog niet ontvangen hebben. Kunt u dit nazien ? (Ook in onze administratie kan een fout zitten !)

## Esperanto, taal voor Europa ?

Tio estis la titolo de prelego de S-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, kiu okazis la 28an de februaro, laŭ invito de Europakring Gent, asocio de studentoj kiuj interesiĝas pri eŭropaj aferoj. 50-o da ĉeestantoj el diversaj fakultatoj aŭskultis eksponadon pri la lingvaj problemoj de la Eŭropa Komunumaro kaj pri la solvoj kiujn proponas la Esperanto-Movado tiurilate. Membroj de la Genta Esperantogrupo organizis etan ekspozicion kaj disdonis informfoliojn pri la lingvo kaj pri rapidkurso, organizota en Gent la 17an de marto.


Post la prelego, S-ro Maertens, estraranoj de la Europakring kaj mi mem ankoraŭ diskutis pri la temo de la prelego en apuda trinkejo. Kaj la preleginto, kaj la estraro estis kontentaj pri la sukceso de la vespero, kiu estis bona por-Esperanta propagandilo en la universitataj medioj. La ekzemplo de Gent estas imitinda aliloke.

André Ruysschaert

## Congres-vignetten

Wenst u uw briefwisseling wat op te fleuren en tegelijk propaganda te maken voor Esperanto ? Dat kan met de zelfklever van het Esperanto-Wereldcongres van deze zomer te Vancouver. Stort 50 fr. op postrekening 000-1410966-04 van Roland Rotsaert en u krijgt er 20 thuisgestuurd.

Ook de "glumarko" van ons congres te Aalst is zopas van de pers gekomen (zwart op gele achtergrond). Hier bedraagt de prijs 50 fr. voor 12, maar u geeft er tevens een financieel ruggesteuntje mee aan de organisatoren.



## El la historio de "Bruĝa Grupo Esperantista" - 2a parto (Ch. Poupeye)

La milito de 1914-18 disigis la membrojn de la B.G. kaj haltigis provizore la grupan vivon. S-ro Witteryck elmigris al Hastings en Anglujo, kaj tie daŭrigis la movadon en kunlaboro kun anglaj samideanoj.

Post lia reveno en 1919 estis neeble al li, pro malsano kaj parta detruo de lia presejo, repreni la prezidantecon de la B.G.

F-ino Yvonne Thooris, unu el la unuaj lernantinoj de S-ro Witteryck, sukcedis al li kiel prezidantino, dum S-ro Sylvain Dervaux, fondinto-prezidanto de la Esperanto-Grupo en Kaprijke kaj translokita al Bruĝo kiel ricevisto de la malrektaj impostoj, helpis ŝin kiel sekretario kaj kursgvidanto. S-ro Witteryck fariĝis tiam Honora Prezidanto.

Dank'al la laborado de tiuj ambaŭ gvidantoj la grupo konis novan progresadon kaj en 1926 ĝi povis denove festi la enskribon de sia 100a membro.

F-ino Thooris restis prezidantino ĝis 1926, kiam S-ro Dervaux sukcedis al ŝi. Tiu lasta ne povis longtempe plenumi la prezidantecon. Jam en 1929 li eksiĝis kiel prezidanto, favore al F-ino Thooris kiu denove fariĝis prezidantino kaj restis tion ĝis 1946.

La 16an de oktobro 1932, la grupo festis sian 30-jaran jubileon per solena kunsido, festeno, prezentado de teatraĵo "Verdreva Revuo" kaj per balo. La prezentado de tiu teatra revuo rikoltis grandegan sukceson.

Je la okazo de sia 30-jara ekzisto la grupo akiris, laŭ Reĝa Dekreto de la 12a de novembro 1932, la titolon "Reĝa Societo".

De la 29a de septembro ĝis la 2a de oktobro 1933 la grupo organizis en la etaĝa salono de "Oud Brugge" gravan ekspozicion de esperantaĵoj. En aŭgusto 1934 la grupo starigis "standon" en la Bruĝa Komerca Foiro kaj okazigis tie dum dek tagoj la plej bonan propagandon por Esperanto. Sama partopreno ankaŭ okazis en 1937.

En februaro 1935 la grupo donis por la unua fojo publikan propagandan balon en "Muntpaleis". Tiu aktiveco estis refarata ĉiujare.

Dum la periodo inter la du mondmilitoj, la grupo povis fieri je valora "Teatra Sekcio", kiu donis multnombrajn prezentadojn kaj gajnis en 1934 la pokalon "Frans Schoofs". Tiel la grupo daŭrigis sian vivadon ĝis 1940, kiam ĉe la eksplodo de la dua mondmilito, ĉia aktiveco estis haltigita.

En oktobro 1941 la Gestapo invadis la domojn de la prezidantino F-ino Thooris kaj de la vicprezidanto S-ro Poupeye. En ambaŭ lokoj estis forprenataj preskaŭ ĉiuj Esperanto-dokumentoj, precipe en la domo de la prezidantino, kie estis forrabataj la grupa flago, la pokalo "Frans Schoofs", aŭtografaj leteroj de D-ro Zamenhof kaj aliaj memoraĵoj.

(daŭrigota)

Alvoko

S-ro Poupeye skribis ĉi tiun historion okaze de la 50-jara jubileo. Por la venonta novaĵletero restas do nur kelkaj linioj. Kiu sperta membro (aŭ grupo da membroj) pretas daŭrigi la laboron ?